# ATEISMO

## Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo




Savita Halappanavar, kies morto instigis ŝanĝon en la irlanda leĝo kontraŭ abortigo.

(Foto el: EPA)


N-ro 26 http://ateisto.org majo 2018

Sciante, ke ĉi-jare la tutmonda esperantistaro kunvenos en Lisbono, Portugalio, mi decidis esplori la religian historion de tiu lando. Ekde vizito en Portugalio en 2003, mi konscias, ke same kiel najbaran Hispanion, islamaj araboj regis grandan parton de la lando dum jarcentoj, kaj ankaŭ same kiel en sia najbaro okazis poste katolika inkvizicio. Ĉi-jare, pretigante tiu ĉi numeron, mi iom pli profundiĝis en la Portugala Inkvizicio. Speciale ŝokis min la hinda "filio" de tiu inkvizicio, en la malgranda teritorio Goao (*Goa* en multaj lingvoj). Junaĝe, mi pasigis kelkajn jarojn en Bombajo, kie loĝas multe de goa-devenaj katolikoj kun portugalaj familiaj nomoj. Sed ĝis nun, mi ne sciis pri la teroro, kiun praktikis la portugaloj en Goao por disvastigi sian religion.

Laŭ mi, la katolika eklezio estas efektive internacia krima organizaĵo, kiu respondecas pri la mortigado, torturado, subpremado kaj seksa misuzo de milionoj da homoj. Krom la diversaj inkvizicioj, kiuj estis regnoj de teroro (interalie kontraŭ judoj, hinduoj, alispecaj kristanoj); estis la diversaj krucmilitoj, kelkaj el ili faritaj en Eŭropo mem kontraŭ paganoj kaj aliaj; estis la *Conquista*, la brutala konkerado de grandaj partoj de la Okcidenta Hemisfero fare de katolika Hispanio kaj altrudado de la katolika religio; estis la subteno pli lastatempe por faŝismaj reĝimoj en Germanio, Italio, Hispanio, Kroatio, kaj en diversaj landoj de Latinameriko kaj en Filipinoj; estas la daŭra tutmonda problemo de la seksa misuzado de infanoj – miloj da sekskrimulaj pastroj estis dumlonge protektataj de eklezîaj kaj civilaj instancoj kaj certe ankoraŭ multaj kazoj estas kaŝitaj aŭ nepunitaj.

La eklezio respondecas pri la mortigado de elstaraj pensantoj kiel Jan Hus kaj Giordano Bruno, kiuj estis mortkondamitaj pro herezo. Sed en nia epoko, ni povas ankaŭ kulpigi la eklezion pri la morto de hind-devena dentistino Savita Halappanavar en Irlando, kiu estis viktimo de malpermeso kontraŭ abortigo, enleĝigita pro la premo de la katolika eklezio. Feliĉe, irlandanoj amase ĵus forĵetis la kontraŭabortigan malpermeson. Ĝi estas parto de pli vasta socia teroro de la eklezio, kiu kontraŭstaras abortigon, uzadon de artefaritaj kontraŭkoncipiloj, eks-geedziĝon kaj samseksamon (pri kiu ĝi estas vere hipokriteca, konsidere kiom de la seksmisuzado de pastroj estas samseksa). La fakto, ke nun oficas en la Vatikano pli afabla, pli tolerema papo ne ŝanĝas la fakton, ke li prezidas grandan kriman entreprenon. Oni povas prezenti kontraŭajn ekzemplojn rilate al katolika bonfarado, ekz. hospitaloj – sed ili estas parto de la katolika provo influi kaj penetri la socion pere de diversaj institucioj.

Mi invitas al legado en tiu ĉi numero ne nur pri la Portugala Inkvizicio kaj la irlanda referendumo, sed ankaŭ pri aliaj temoj interesaj kaj gravaj por ni ateistoj – interalie pri Dio kaj liaj kvalitoj kaj agado (aŭ manko de agado), pri la apartigo de ŝtato kaj religio, pri la eblecoj krei pontojn inter ateismo kaj religio / di-kredo, pri maltrankviligaj sed ankaŭ feliĉigaj novaĵoj el la islama mondo, kaj pri humanismaj alternativoj al religiaj ritoj. Fine, denove pri Lisbono: tiu belega urbo estis frapita de terura tertremo en 1755, kiu ŝajne estis dia puno kontraŭ katolikoj aŭ religiemuloj ĝenerale, ĉar multaj mortis dum preĝado. Certe pli sendanĝere ol preĝi en Lisbono estas ĉeesti la publikan kunvenon de ATEO, kiu okazos tie dum la UK! Bonvolu veni, ne timante inkvizicion nek tertremon, ĉar sendube Dio favoras ateistojn ĉar ili ne faras malbonaĵojn je lia nomo! ☆

# Ĉu eblas esti ateisma kaj religia?

**Multaj artikoloj en ĉi tiu tre valora bulteno, same kiel aliaj ateismaj tekstoj, baziĝas sur la antaŭsupozo, ke ateismo kaj religieco nepre malakordas, do ne eblas esti ateisma kaj religia samtempe. En ĉi tiu artikolo, mi ŝatus ĵeti iom da dubo sur tiun antaŭsupozon.**

Mi kreskis en socio, kie en preskaŭ ĉiuj diskutoj pri ateismo kaj religio superregis la antaŭsupozo, ke ili estas nekombineblaj kontraŭoj. Sekve mi mem estis firme konvinkita pri ĉi tiu antaŭsupozo, ĝis kiam en 2014 mi malkovris sendogman kaj racieman religian komunumon, kiu depende de la lando nomiĝas aŭ *Unuisma Universalismo* (ĉefe en Nord-Ameriko, anglalingve "Unitarian Universalism") aŭ simple *Unuismo*. En ĝi pace kunagas ateistoj, agnostikuloj kaj diversspecaj Di-kredantoj.

Nun vi verŝajne demandas vin: Kiel tio eblas? Kiel oni povas nomi ion religio, se ĝi ne havas dogmojn, kaj se ĝi kunigas homojn kun diversaj kredoj pri la ekzisto de supernaturaj fenomenoj? Nu, fakte ekzistas malsamaj manieroj difini, kio estas religio. Tiuj difinoj, kiuj eksplicite mencias la ekziston de dogmoj aŭ la kredon je io supernatura estas diverskiale iom problemaj, ĉar temas pri konceptoj ĉefe aplikeblaj al abrahamaj kaj Okcidentaj religioj. En Orient-Azio ekzemple ekzistas diversaj religioj, kiuj tute ne difiniĝas per dogmoj, sed per tradiciaj praktikoj. Tial por multaj japanoj ne estas kontraŭdiro, ke iu partoprenas ŝintoajn solenaĵojn, geedziĝas kristane kaj ricevas budhisman funebron. Interalie pro tio, en la religiscienco ekzistas difinoj de *religio*, kiuj evitas mencion de dogmoj kaj supernaturaĵoj (vidu Clifford Geertz, 1965).

### Historio kaj praktiko de Unuismo kaj Unuisma Universalismo

La moderna Unuismo kaj Unuisma Universalismo formiĝis surbaze de du branĉoj de Kristanismo, kiuj origine apartiĝis de la kristanisma ĉeffluo pro la neado de iuj kristanaj dogmoj (vidu Bumbaugh, 2000): La unuistoj neis la dogmon de Triunuo kaj pledis por unupersoneca kompreno de Dio, kiel en judismo kaj islamo. La universalistoj neis, ke Dio punas iujn homojn per infero. Dum la 19a kaj frua 20a jarcentoj, en Nordameriko tiuj du branĉoj de Kristanismo iĝis pli kaj pli liberalaj, raciemaj kaj akceptemaj al neado de aliaj tradiciaj dogmoj de Kristanismo, kaj ĉe la unuistoj eĉ estiĝis la emo ne plu identiĝi kiel kristanoj. En 1961 la du liberalaj religiaj komunumoj decidis kuniĝi, kaj tiel estiĝis la Unuisma Universalismo. En la sekvaj jaroj unuflanke fortiĝis la humanismaj tendencoj kaj la akceptemo al ateismo en tiu religia komunumo, kaj samtempe ĝi malfermiĝis al nekristanaj religiaj influoj kiel budhisma meditado kaj novpaganismaj ideoj pri la sankteco de la naturo.

La nuntempan UU karakterizas "libera kaj respondeca serĉo de vero kaj signifo", laŭ la vortumo de unu el la Sep Principoj de UU (vidu Mendelsohn, 2006). Tio implicas, ke ĉiu UU-ano rajtas serĉi sian propran veron pri tiaj aferoj kiel la ekzisto, naturo, la signifo de la vivo, dioj kaj la postvivo. Samtempe ja ekzistas komune akceptataj etikaj principoj, kaj komuna emo subteni unu la alian en la serĉado de vero kaj signifo, en la praktika realigado de la etikaj principoj sur persona kaj socia nivelo, kaj en la plenumado de spiritaj bezonoj, ekzemple per solenaĵoj kaj meditado. La deveno de UU el iuj branĉoj de protestantismo daŭre estas kelkrilate sentebla, ekzemple ĉe la uzo de esprimoj kiel "preĝejo" kaj la ekzisto de dimanĉa solenaĵo. Tiuj dimanĉaj solenaĵoj kutime enhavas interalie kantadon de divers-originaj himnoj kaj predikaĵon kun etika, filozofia aŭ inspira temo.

Krome la UU-aj organizaĵoj estas diversmaniere aktivaj por sociaj aŭ politikaj celoj konformaj al ilia etiko de respekto por ĉiuj homoj, ekzemple por seksa egaleco aŭ kontraŭ rasis-

mo. Jam en la 1970aj jaroj, UU estis inter la unuaj religioj, kiuj regule organizis ejdzigajn[1] ceremoniojn por samseksemaj paroj, kaj ĝi nuntempe havas multajn samseksemajn kaj plurajn transseksajn pastrojn.

Mi ĝis nun ĉefe priskribis la usonan kaj kanadan Unuisman Universalismon, sed ekzistas rilataj religiaj komunumoj alilande. Jam de la 16a jarcento ekzistis unuisma eklezio ĉe la hungaroj en Transilvanio kaj Hungarujo, kiu tamen malsame ol la nordamerika UU restis klare kristana. Simila religi-humanisma evoluo kiel en Nordameriko okazis en Britujo, nur ke tie neniam enradikiĝis universalismo, tiel ke ili nomas sin simple Unuistoj. Inspirite de la nordamerika aŭ brita movado, en pluraj aliaj landoj de Eŭropo, Azio kaj Afriko je diversaj tempoj estiĝis similaj religi-humanismaj movadoj, kiuj nomas sin jen Unuistoj, jen Unuismaj Universalistoj.

Pro la akceptado de ateistoj kaj agnostikuloj, la subteno al humanismaj etikaj principoj, kaj la socia kaj politika aktivado por tiuj principoj, oni povus havi la impreson ke la unuismaj komunumoj pli similas al nereligiaj humanismaj/politikaj asocioj ol al la vaste konataj religiaj organizaĵoj kaj eklezioj. Kaj tio ja iugrade estas vera. Samtempe ili tamen havas trajtojn, kiuj memorigas pri religioj. Krom la supre menciitaj trajtoj, oni relative multe parolas pri persona transformiĝo, do pri tio, kiel oni mem devas ŝanĝiĝi por vivi pli bone kaj pli harmonie kun sia medio. Aldone, UU-anoj relative ofte uzas vortojn kiel *sankta* kaj *dieca* en siaj solenaĵoj kaj filozofiumado, kaj foje ankaŭ pli eksplicite religiajn terminojn kiel *Dio* kaj *preĝi*, eĉ se ili ofte donas netradiciajn aŭ metaforecajn interpretojn al tiuj. Krome, UU-aj organizaĵoj aktive partoprenas en interreligia dialogo, sed ankaŭ en dialogo kun sekulare humanismaj organizaĵoj.

La simbolo de Unuisma Universalismo (Fonto: Unitarian Universalist Association)

**Kial mi aliĝis al Unuisma Universalismo**

Kial do ateistoj aliĝas al tia religie humanisma komunumo? Pro la diverseco de la pensmanieroj de diversaj homoj, ne vere eblas ĝeneraligi, do mi nur provu skizi kelkajn el la kialoj, pro kiuj mi decidis aliĝi al Unuisma Universalismo kaj ekaktivi por ĝi.

Mi ŝatas la fakton, ke temas pri komunumo de homoj, kiu interesiĝas pri sen-antaŭjuĝa esplorado de profundaj demandoj pri la homa vivo, la homa socio kaj nia mondo, kaj kiuj pretas subteni unu la alian sendepende de tio, kiujn respondojn al tiuj demandoj oni preferas. Krome, tiu komunumo helpas al oni evoluigi spiritajn praktikojn (ekz. meditado) sen ligi tion al difinita kredosistemo.

Partoprenante en tiu komunumo, oni konatiĝas kun inspiraj filozofiaj, etikaj kaj socipolitikaj ideoj, kiuj estas parte esprimataj en objektiva scienceca lingvaĵo, kaj parte esprimataj surbaze de metaforriĉa lingvaĵo, kun metaforoj bazitaj sur diversaj literaturaj, religiaj kaj filozofiaj tradicioj. Tio kreas la bazon por pensmaniero, kiu ebligas koncepti gravajn demandojn en diversaj manieroj.

Krome, la sinteno de Unuisma Universalismo al aliaj religioj helpas al oni eviti simplismajn asertojn pri religiuloj: Ĝi helpas pli klare distingi inter la liberalaj religiuloj unuflanke, kiuj povas esti aliancanoj de ateistoj kaj humanistoj, kaj la fundamentistoj kaj konservemeguloj aliflanke, kiuj estas vera danĝero por la paca kunvivado de diverspensaj homoj en nia moderna socio, dum la granda grupo de moderaj religiuloj situas iel inter tiuj ekstremoj. Se oni ĉiam nur kontraŭbatalas kaj ridindigas ĉian religiemon, oni riskas per tio kontribui al puŝado de moderaj religiuloj en la brakojn de funda-

[1] Mi ĉi tie uzas la seksneŭtralan novradikon *ejdz/o*, kiu signifas 'edzo aŭ edzino aŭ sekse neduuma persono en tia rilato'.

mentistoj kaj konservemeguloj.

Fine, tre grava faktoro por mi estas la komuna aktivismo por homaj rajtoj kaj kontraŭ ĉia diskriminacio, kiu estas tre forta en la UU-aj komunumoj.

Unuisma Universalismo tute ne estas misia religio, do ankaŭ la celo de ĉi tiu artikolo ne estas konvinki iun aliĝi al UU, sed nur iom konsciigi homojn pri ĝia ekzisto kaj pri tio, ke ateismo kaj religieco ne nepre estas en konflikto, kaj ke ekzistas ankaŭ aliaj ebloj ol la du ekstremoj de dogma religieco kaj kontraŭado de ĉia religiemo.

**Referencoj**

Bumbaugh, David E. (2000). *Unitarian Universalism: a narrative history.* Chicago: Meadville Lombard Press

Geertz, Clifford (1965). Religion as a cultural system. En M. Banton (red.), *Anthropological Approaches to the Study of Religion,* paĝoj 1–46.

Mendelsohn, Jack (2006). *Being Liberal in an Illiberal Age – Why I am a Unitarian Universalist.* Boston: Skinner House Books

**Markos Kramer (Germanio)**

## Ĉeĥa reĝisoro pri la katolika eklezio

Demando al sukcesa ĉeĥa filmreĝisoro de komediaj filmoj Zdenek Troška: “Kristnaskaj kaj paskaj festoj estas la plej gravaj religiaj festotagoj. Tamen vi primokas en viaj filmoj pastrojn, kaj via rilato al eklezioj estas konata kiel negativa. Kial vi – knabo el vilaĝo kaj eksa asistanto dum mesoj – ŝanĝis vian opinion?” Li respondas jene:



Jes, mi malŝatas la sanktan eklezion. Kial ĝin ŝati? Kiel bazlernejano mi lernis lecionojn de kateĥismo, jarojn mi asistis kaj ludis orgenon en preĝejeto. Dum maturiĝo mi observis la vivon ĉirkaŭ mi kaj diversajn aferojn kunigis, serĉis interrilatojn, ĉefe en religia-historia kunteksto.

Unu afero estas la kredo “Kredu ĉiu, kiu mem volas”, tio estas libera elekto, kaj se la kredo helpas en vivo de unuopulo, ĉio estas en ordo. Alia afero estas religio kaj eklezio.


La eklezio estas firmao kaj religio estas ĝia tre bone elpensita produkto. Mi detale studis la historion de la eklezio (katolika), papecon, inkvizicion kaj ekleziajn ordenojn. Kaj kion mi konkludis? Du jarmiloj da konstantaj bataloj pri povo kaj posedo, nenio alia. En la nomo de Dio kaj Kristo. Tiuj, kiuj ne jesis, estis proklamitaj herezuloj kaj sen graco persekutitaj. Same faris diktatoroj.

Sufiĉas observi ĉirkaŭ si, kiel la eklezio sekvas sian Sinjoron. Li en modesta ĉemizo, senŝua, kaj ili en oraj ornatoj kaj multekostaj aŭtomobiloj. Li manĝigis mizerulojn, ili en nomo de senhonta restituado forprenas kampojn, arbarojn, lagojn, konstruaĵojn, valoraĵojn. Mi pensas, ke se Kristo tion vidus, li ekplorus amare kaj preferus iri kun mi trinki bieron.

*El la blogo de Zdenek Troška. Tradukis* ***J. Drahotová (Ĉeĥio)***

# Diismo: inter teismo kaj ateismo

Diismo estas tre interesa filozofia pozicio, ĉar ĝi kombinas kredon je Dio kun kredo je racio kaj malakcepto de religioj. Eble la plej fama diisma verko estas *The Age of Reason* (La Epoko de Racio) de brito / usonano Thomas Paine. En tiu verko el la jaro 1794 Paine akre kaj amplekse kritikas la Biblion kaj forte provas bazi di-kredon sur racio kaj scienco. Tio, kio ĉefe distingas la dion de diismo disde tiu de religioj estas ke ĝi estas la kreinto de la universo kaj ĝiaj fizikaj leĝoj, sed ne aganto en tiu universo. Tial, unusence, la universo post sia kreiĝo estas sendia, do efektive ateismo validas; sed alisence, oni admiru la universon kiel dian kreaĵon kaj per racio (mem dia kreaĵo) esploru kaj ekkomprenu ĝin. Do, verdire diismo kuŝas inter teismo kaj ateismo.



Thomas Paine, aŭtoro de *La Epoko de Racio*

Al diismo aliĝis iuj el la plej brilaj kaj konataj figuroj de la 18a jarcento, ekzemple Voltaire, Rousseau, Kosciuszko, Jefferson, Madison kaj la jam menciita Paine. En tiu epoko ĝi estis ofte rigardata kiel radikala kaj blasfema kredo proksima al ateismo – en Britio *The Age of Reason* estis malpermesata dum multaj jaroj. Kvankam ĝi preskaŭ malaperis en la 19a jarcento (kun iuj esceptoj, kiel Mark Twain, kiu efektive estis diisto, kaj eldonis kontraŭreligiajn rakontojn), diismo nun ĝuas iagradan repopulariĝon. En artikolo en tiu ĉi numero, oni povas legi pri la kresko de diismo, kune kun ateismo, inter junaj homoj en Turkio. Laŭ esploro farita en Usono en 2008 fare de Trinity College (Connecticut), 12% da usonanoj estis diistoj, same kiel la elcento da ateistoj kaj agnostikuloj (laŭ iliaj esprimitaj kredoj).

La diisma kredo ĉefe baziĝas sur la teleologia argumento por la ekzisto de Dio, laŭ kiu la naturo montras en si projektadon fare de Dio, kaj sur la kosmologia argumento, laŭ kiu ĉio havas kaŭzon kaj devas ekzisti la Unua Kaŭzo, nome Dio. La du estas interligitaj kaj ni ateistoj bone konas diversajn kontraŭargumentojn. Krom la problemoj kun tiuj argumentoj, ekzistas la problemo, ke diistoj, same kiel aliaj teistoj, pensas, ke ili konas la trajtojn de Dio – kia ĝi estas, kiel ĝi agas, kion ĝi faras, kion ĝi ne faras. Sed kiel ili scias ion ajn pri Dio? Krome, kredantoj havas multajn diversajn priskribojn de Dio. Diismo, do suferas pro kelkaj fundamentaj malfortoj, simile kiel aliaj kredoj, kiuj asertas la ekziston de Supera Estaĵo.

Tamen, pli pozitiva el ateisma vidpunkto estas la malakcepto de religio fare de diistoj, krom tio, kion ili nomas "natura religio". Ili speciale malakceptas revelaciadon kaj miraklojn kiel pruvojn de la ekzisto de Dio, kaj kiel bazojn de kredosistemoj. Ne malpli ol ateistoj, diistoj kontraŭstaras organizitajn religiojn kun ties sanktaj libroj, dogmoj, profetoj, pastroj kaj kontraŭsciencaj asertoj. Ĉar diistoj argumentas kaj agas precipe kontraŭ religioj, kaj disvastigas racion kaj sciencan aliron, ili estas naturaj aliancanoj de ni ateistoj. Certe la mondo estus multe pli bona loko, se religiuloj transirus al diismo. Kiel mi menciis en la unua alineo, la diisma universo estas iasence sendia – Dio ne agas en ĝi – do diistoj estas iagrade ateistoj. Do, kaj el vidpunkto de tiu filozofia kredo, kaj el vidpunkto de ilia kontraŭreligiemo rezultanta el tiu kredo, ni ateistoj estu malfermitaj al la ideo varbi diistojn al niaj organizaĵoj.

**Nyegosh Dube (Pollando)**

☆

# Konsilo al kristanoj

Ĉeĥa esperantisto estas maltrankvila pri al sorto de mia animo. Lastatempe mi ricevis koverton adresitan al mi kiel sekretario de ATEO, en kiu troviĝis nur tri anglalingvaj flugfolietoj de la speco, kiajn evangeliistoj foje disdonas en la strato. Jen specimeno de la enhavo (ilustrita per kruco, kolomboj kaj malfermita Biblio):

> Johano 3:16 Kion ĝi signifas?
>
> Koncize, ĝi rakontas la ĉefan mesaĝon de la Biblio, t.e. kiel eblas plene sperti la vivon nun en ĉi tiu vivo… kaj por ĉiam.
>
> **Kio malhelpas min sperti tion kaj kiel ni povos komenci?**
>
> *Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al Li ne pereu, sed havu eternan vivon.*
>
> Koncentriĝante je 5 ŝlosilaj vortoj…
>
> **Vivo Mondo Dio Filo Fido**
>
> Dio malkaŝas tion, kion Li deziras, ke vi sciu kaj spertu.

Tio sufiĉas por doni al vi impreson pri la enhavo. Sendube vi jam rekonas la stilon.

Ne la unuan fojon mia anonima korespondanto montris tian zorgemon pri mia anima bonfarto. Antaŭ unu jaro mi ricevis el Ĉeĥujo libron de iu Vinko Ošlak kun la titolo *There's Probably No Atheist / Probable troviĝas neniu ateisto* – same sen iu ajn noto aŭ indiko pri la sendinto. (Mi ne scias, ĉu ĝi estis sendita de la aŭtoro mem.) Malgraŭ la titolo duone anglalingva, la verko estas en Esperanto. Mi efektive ĵetis rigardon en la libron, scivola kial la verkinto transiris de ateismo al Kristanismo, kaj interesata malkovri per kiaj argumentoj li provos konvinki ankaŭ min. Sed fakte mi trovis la enhavon tiel densa, konfuza kaj profunde teda, ke mi ne havis paciencon legi pli ol 1-2 paĝojn. Ĝi certe ne konvinkus iun ajn, kiu ne jam dezirus esti konvinkita. Verŝajne ĝi eĉ ne celas homojn kiel mi, sed tiujn, kiuj serĉas konfirmon de siaj jamaj opinioj.

Do, jen mia konsilo al niaj kristanaj geamikoj: se vi deziras atingi ateistojn, vi devos verki multe pli legindajn informilojn. Sed sendube, neniu kristano vidos tiun utilan konsilon, same kiel ŝi/li supozeble ne malŝparos tempon legante *La iluzio Dio* (populara verko de fama ateisto Richard Dawkins). La fakto estas, ke la plejmulto el ni dediĉas multe da pensado al tiaj temoj dum la adoleskeco, sed forminte nian opinion, ni poste turnas nian menson al aliaj aferoj. Tio validas por preskaŭ ĉiuj, ĉu religiuloj, ĉu ateistoj. Se ne jam ekzistus ia dubo en nia menso, ni malprobable ŝanĝus niajn ideojn kiel plenkreskuloj.

**La Biblio kiel talismano**

Lastatempe en homplena aĉetcentro mi aŭdis junulon kun mikrofono parkere citi versojn el la Biblio al ĉiuj preterpasantoj, kiuj indiferente preterrapidis kun siaj sakoj plenaj je aĉetaĵoj. Kion li esperis atingi per tio? Ĉu li supozis, ke nur aŭdante tiujn versojn, iuj homoj demetos siajn pezajn sakojn kaj haltos por aŭskulti?

Kaj tamen, por iuj di-kredantoj la Biblio estas libro kun magia potenco. Sufiĉas nur legi el ĝi kelkajn versojn, por ke oni estu trafita de la Vero. La flugfolietoj senditaj al mi el Ĉeĥujo estis plenaj je bibliaj citaĵoj: "… mi venis, por ke ili havu vivon, kaj havu ĝin abunde." (Johano 10:10); "Vere, vere, mi diras al vi: Kiu kredas, tiu havas vivon eternan." (Johano 6:47); "… ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas

dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu.” (Letero al la Efesanoj 2:8-9) ktp, ktp.

Ekzistas societoj, kies celo estas traduki la Biblion en ĉiujn konatajn lingvojn. Se iam en la tirkesto de via hotelĉambro vi trovis senpagan Biblion, tio estis lasita tie de la societo Gideon, kiu provizas ne nur hotelojn, sed ankaŭ armeojn, malsanulejojn, malliberejojn kaj lernejojn per la magia libro. Tamen, kelkaj hotelkompanioj komencas ne plu akcepti ilin, interalie pro praktikaj kialoj rilate al redekoraciado de la ĉambroj sen tirkestoj. Laŭ la Eklezio de Anglujo, tio estas “tragedia kaj stranga decido”, ĉar biblioj en hotelĉambroj povas doni al vojaĝantoj esperon, konsolon kaj inspiron.

**Ne sufiĉas bibliaj citaĵoj**

Usona misiisto Daniel Everett dum la 70aj jaroj loĝis kun sia familio ĉe amazonia tribo, la Pirahã, kun la celo lerni ĝian lingvon por traduki en ĝin la Biblion. Li rakontis pri sia sperto en tre interesa libro *Ne dormu, estas serpentoj.* Iom post iom li lernis sufiĉe por komenci sian traduklaboron, sed li trovis, ke la tribanoj estis tute nekonvinkitaj de la rakontoj pri Jesuo. Ili mem kredas nur je tio, kion ili mem aŭ persona konato vidis per la propraj okuloj. Do, kompreninte ke Everett neniam renkontis Jesuon, nek konas iun kiu renkontis lin, ili tutsimple rifuzis kredi je ties ekzisto.

Finfine, la misiisto ne konvertis la tribanojn, sed la tribanoj konvertis la misiiston. Krom ilia absoluta rifuzo kredi la eksterordinarajn rakontojn en la Biblio, Everett komencis rimarki, ke eĉ sen Jesuo ili vivas tre feliĉe kaj kontente en sia propra medio. Li ekdemandis sin, ĉu la religio, kiun li volas proponi al tiu popolo, efektive plibonigus ilian ekziston, kaj konkludis, ke ne. Kaj plie: iom post iom li mem forlasis sian religian kredon. Tio estis por li malfacila situacio, ĉar dum li travivis tiun krizon, li ne povis kundividi siajn dubojn kun siaj edzino kaj familio. Kiam li finfine malkaŝis sian ateismon al sia edzino, ilia geedzeco rompiĝis.

Nu – rakontante pri tiu interesa libro, mi forlasis mian temon: pri la Biblio kiel talismano. Ĉar efektive Everett konstatis, ke la vereco de la rakontoj en tiu libro ne estas evidenta al popolo, kiu ne kredas je neekzistantaj aferoj. Kelkaj citaĵoj el la Biblio ne sufiĉas por ŝanĝi la vidpunkton de homo kun tute alia mondkoncepto.

**Anna Lowenstein (Britio)** ☆

## Ĉu bona Dio?

Ĉiutage radio kaj televido alportas al ni informojn pri novaj kruelaĵoj faritaj de homo. Nu, kio estas homo? Ĉu estaĵo kreita de Dio, kiu ja kapablus krei estaĵon bonan kaj bonfaran? Se jes, kial li preferis krei estaĵon kruelan kaj stultan?”

Se tio ne estas la plej terura el la malbonaj faroj, kio ĝi estas? Kaj Dio, konsternita pro la kruelaĵoj de sia kreaĵo, kion li faris, li la kulpulo? Li kondamnis sian filon al la plej kruela kaj terura morto imagebla: najlado sur kruco.

Kiu povas kredigi al ni, ke tia Dio estas bona?

**Jean Marin (Francio)** ☆

## Renaskiĝo de printempo

**Ju pli mi maljuniĝas …**

Des pli la alveno de printempo
min mirigas.

Des pli mi malkovras eventojn kiujn
mi ne antaŭe rimarkis.

Des pli mi aŭskultas la kanzonon de la
birdoj, kies melodio min ravas.

Des pli mi zorgas pri miaj plantoj kaj
miaj floroj, kiuj mirigas min.

Des pli mi konstatas, ke mi ne pensis
tiel kiam mi estis pli juna.

Des pli mi ekvidas, ke estas pli da
printempoj malantaŭ mi ol antaŭ.

Des pli mi uzas tempon por frandi
ĉiun sekundon, ĉiun minuton,
kiu pasas.

Des pli mi dankas la vivon, kiu ebligas
min revivi ankoraŭ unufoje la
Renaskiĝon de la Printempo.

*Modifita versio de "Sekreta Ĝardeno" de Richard Clayderman, tradukita de* **Jean Marin (Francio)**

☆

## La Portugala Inkvizicio: nekonata sed brutala

La Hispana Inkvizicio estas vaste konata. Verŝajne ĝi estas la plej fifama ekzemplo de kristana kaj katolika netoleremo kaj persekutado. Sed multe malpli konata estas ĝia pli juna frato, la Portugala Inkvizicio, kiu estis lanĉita 58 jarojn poste en 1536 kaj oficiale daŭris ĝis 1821. Tiu ĉi dua iberia inkvizicio havis ĉiujn elementojn de la unua: enkarcerigadon, torturadon kaj ekzekutadon (kutime per bruligado), kaj ankaŭ konfiskadon de proprietaĵoj.


Dum la hispana versio celis kaj eksjudojn kaj eksislamanojn preme konvertitajn al Katolikismo kaj akuzitajn pri sekreta praktikado de siaj antaŭaj religioj, la portugala versio ĉefe celis eksjudojn, simple ĉar islamanoj en Portugalio estis forpelitaj en 1496. Tamen ene de la Portugala Inkvizicio estis ligita inkvizicio en Goao, portugala kolonieto en Hindio – ĝi celis hinduojn, islamanojn kaj judojn. La goaa parto de la Portugala Inkvizicio estas verŝajne eĉ malpli konata ol la iberia. Ankaŭ aliaj portugalaj kolonioj, kiel Brazilo, estis tuŝitaj, sed malpli severe.

**Inkvizicio en Portugalio**

La persekutado de la judoj de Portugalio komenciĝis jam en 1496, nur kvar jarojn post kiam Hispanio forpelis siajn nekonvertiĝintajn judojn. Fakte la plimulto de la hispanjudaj forpelitoj migris al Portugalio, sed la persekutado sekvis ilin. Nesurprize la hispanaj kaj portugalaj persekutadoj estis ligitaj. La tiama portugala reĝo Emanuelo la 1ª, dum kies regno Portugalio akiris imperion, deziris edziĝi al filino de la hispanaj gereĝoj Ferdinando kaj Izabela. Ilia kondiĉo por la geedziĝo estis la forpelado de judoj de Portugalio. Do Emanuelo dekretis, ke judoj konvertiĝu aŭ estu forpelitaj, tamen poste ne permesis al ili elmigri kaj simple devigis ilin konvertiĝi – uzante eĉ la minaco forpreni iliajn infanojn. (Samtempe li forpelis islamanojn.) Tial kreiĝis sufiĉe granda nombro da novkristanoj.

Estis ĝuste tiuj ĉi novkristanoj, kiuj estis la ĉefaj viktimoj de la Inkvizicio en Portugalio, lanĉita

en 1536 fare de reĝo Johano la 3ª, la posteulo (kaj filo) de Emanuelo. Johano jam en la jaro de sia reĝiĝo 1521 petis la papon aprobi inkvizicion en Portugalio, sed tiu ne konsentis. Nur post 15 jaroj alia papo, Paŭlo la 3ª, konsentis. Kiel en Hispanio, la inkvizicion estris Ĝenerala Inkviziciisto elektita de la reĝo. Specialaj inkviziciaj tribunaloj estis establitaj en diversaj urboj. Laŭ la oficialaj registroj de "aŭtodafeoj" (grandaj publikaj ceremonioj, kie juĝoj estis proklamitaj), ĉirkaŭ 30 000 homoj estis akuzitaj kaj procesitaj de tiuj tribunaloj inter 1536 kaj 1794. Torturado estis ofte uzata por devigi konfesojn. La granda plimulto de la akuzitoj estis kondamnitaj al enkarceriĝo, sendube en aĉaj kondiĉoj, sed almenaŭ 1100 estis ekzekutitaj, ĉefe per ŝtipar-bruligado. La nombro da ekzekutitoj verŝajne estas pli alta, ĉar la registroj ne estas kompletaj, kaj ankaŭ multaj certe mortis dum enkarceriĝo – pri ili ne estas ciferoj. Ankaŭ menciindas, ke la propraĵoj de akuzitoj estis konfiskitaj, do la Inkvizicio estis formo de institucia ŝtelado, kiu riĉigis la inkviziciistojn.


Ŝtipbruligado de kondamnitoj en Lisbono dum aŭtodafeo

**Inkvizicio en Goao**

La hinda ŝtato de Goao nun estas konata kiel bel-plaĝa paradizo, kiu allogas multajn okcidentajn turistojn. Ekde 1510 ĝis 1961, ĝi estis portugala kolonio. Dum ĉirkaŭ 280 jaroj en tiu kolonia periodo, Goao spertis verŝajne unu el la plej severaj religiaj persekutadoj en la monda historio. Kvankam la formala inkvizicio estis lanĉita tie en 1560, persekutado komenciĝis jam pli frue. Okazis vastskala atako kontraŭ alikredaj lokaj loĝantoj – hinduoj ĉefe, sed ankaŭ islamanoj kaj judoj (ĉi-lastaj plejparte jam fuĝintoj de persekutado en Iberio) – kaj iliaj preĝejoj, kaj ankaŭ kontraŭ la lingvoj de la lokanoj. Tiu atako similis al la brutala traktado de la indiĝenoj de Meksiko kaj Peruo fare de la hispanaj *konkistadoroj.*

Fondinte sian kolonion, la portugaloj baldaŭ komencis disvastigi sian religion. En la fruaj jaroj multaj lokanoj konvertiĝis pro la misiista agado de katolikaj ordenoj (Jezuitoj ktp) kaj pro diversaj avantaĝoj ekonomiaj kaj sociaj. Sed poste komenciĝis persekutado de homoj kiuj ne konvertiĝis, kaj ankaŭ de konvertiĝintoj, multaj el kiuj daŭre iagrade praktikis Hinduismon aŭ Islamon sekrete simile kiel la novkristanoj en Iberio praktikis judismon aŭ Islamon – sed foje homoj estis false akuzitaj pri tia praktikado. Oficiala mortigado de hindaj novkristanoj akuzitaj pri herezo estis registrita jam ekde 1539. En 1546, la portugala reĝo Johano la 3ª dekretis malpermeson de Hinduismo kaj hinduaj festoj, kaj detruadon de hinduaj temploj. La saman jaron, Francisko Ksavero, kunfondinto de la jezuitoj, kiu aktivis en Goao, skribis al la reĝo petante lin komenci inkvizicion tie. Tiu peto estis plenumita en 1560 de posta reĝo.

La lanĉo de formala Inkvizicio plivastigis la jam okazantan persekutadon. Jen kiel aspektis la katolika teroro antaŭ- kaj duminkvizicia: ĉiuj hinduaj temploj, ĉirkaŭ 760 entute, estis detruitaj kaj iliaj teroj konfiskitaj; skribaĵoj en hindaj lingvoj estis bruligitaj, kaj eĉ parolado en tiuj lingvoj estis malpermesita; praktikado de la hindua religio estis mortpunebla – eĉ posedado de hindua statueto povus rezultigi areston kaj

turmentadon; hinduaj geedziĝaj kaj funebraj ceremonioj estis malpermesitaj; nekristanoj estis multmaniere diskriminaciataj; teroro estis ofte uzata por konverti homojn, ekz. disŝirado de infanaj korpomembroj ĝis gepatroj konvertiĝis; pli ol 16 000 homoj estis procesitaj de inkviziciaj tribunaloj – multaj el ili estis enkarcerigitaj, turmentitaj, malsatmortigitaj, brulmortigitaj, kaj la proprietaĵoj de ĉiuj akuzitoj estis konfiskitaj.

Ĝis la fino de la 17ª jarcento, el loĝantaro de 250 000, restis malpli ol 20 000 nekristanoj – tiom vastskala estis la konvertiĝo. Nesurprize, pro la teroro, miloj da homoj fuĝis el Goao al najbaraj regionoj, inkluzive de sufiĉe multe da kristanoj, kiuj ne plu povis toleri la inkvizician polican ŝtaton.

*Artikolo verkita interalie surbaze de la vikipediaj artikoloj "Portuguese Inquisition" kaj "Goa Inquisition" kaj ankaŭ de la artikoloj "1536: The Inquisition Is Formally Introduced Into Portugal" (Haaretz) kaj "35 Brutal Facts of Goa Inquisition" (Navrangindia).*

**Nyegosh Dube (Pollando)**

☆

# La lisbona tertremo de 1755 kaj ĝiaj teologiaj postsekvoj

Ĉirkaŭ je la 9:40 matene la 1-an de novembro, la Tago de Ĉiuj Sanktuloj, kiam kristanoj memoras mortintojn, en la jaro 1755, terura tertremo (taksita nun je 8.5-9.0 laŭ skalo Richter) frapis Lisbonon sekvita de cunamo kaj grandaj fajroj. Tiuj eventoj kaŭzis la morton de 30 000-60 000 homoj (el loĝantaro de 200 000) kaj la detruiĝon de ĉirkaŭ 85% de la urbo. Multaj fakte mortis ĉeestante mesojn en preĝejoj, kiuj kolapsis.



Lisbono frapata de granda tertremo en 1755

La tertremo estis vaste kaj detale raportita kaj ŝokis Eŭropon. Ĝi instigis filozofiajn-teologiajn debatojn rilate al la provo klarigi la kunekziston de bona Dio kun malbono sur nia Tero. Homoj demandis: kiel bona Dio povus kaŭzi aŭ permesi tian teruran okazaĵon kiel la lisbona tertremo? Multaj katolikoj asertis, ke tio estis puno de Dio pro homa pekado, tamen aliaj rimarkis, ke multaj preĝejoj detruiĝis dum bordeloj en la ruĝ-luma kvartalo plejparte travivis! Tial ili demandis kiel la katastrofo povas esti puno pro pekado. Aliflanke multaj protestantoj, precipe kalvinistoj, pensis, ke la katastrofo estis dia puno kontraŭ katolikoj, kio klarigas la detruon de la preĝejoj dum katolikaj mesoj! Ĝenerale la tertremo plifortigis racian, sciencan, kaj kritikan pensadon pri la mondo kaj pliigis dubojn pri religiaj kredoj.

Neniu klerulo tiel forte reagis al la tertremo kiel la franca filozofo kaj verkisto Voltaire, kiu verkis jam en 1755 longan poemon pri ĝi, kun la simpla titolo *Poème sur le désastre de Lisbonne* (Poemo pri la katastrofo de Lisbono). En la poemo, li demandis: kial Lisbono? Ĉu oni pli multe pekis tie ol en Londono aŭ Parizo? Fakte, lisbonanoj estis multe pli religiemaj ol la loĝantoj de tiuj urboj. Kelkajn jarojn poste li aperigis la romanon *Candide* (Kandid), lia plej

fama verko, en kiu la lisbona tertremo ludas gravan rolon. En ambaŭ verkoj Voltaire akre kritikis la optimisman ideon subtenitan de la germana filozofo kaj kristano Gottfried Leibniz, ke Dio estas bona, kaj ke tial ni vivas en la plej bona el ĉiuj eblaj mondoj, ke malbono estas bezonata por kompreni bonon, ke malbona devas esti pesita kontraŭ la tutaĵo de la universo kaj la dia plano.

Voltaire estis diisto* kaj laŭ li, la tertremo pruvis, ke Dio ne intervenas en la universo kaj la mondo, ne celas bonon, ĉar bona intervenanta Dio ne permesus malbonojn kiel la lisbona katastrofo. Svisa filozofo Jean-Jacques Rousseau, kvankam ankaŭ diisto, preferis la aliron de Leibniz, kaj kulpigis homan malsaĝon por la alta nombro da mortoj. Voltaire kaj Rousseau ambaŭ efektive subtenis naturan sendian klarigon por la tertremo. Same la germana filozofo Immanuel Kant, kiu respondis al la tertremo ne filozofie, sed tute science per tekstoj en kiuj li prezentis sciencajn klarigojn – li iasence naskis seismologion. Ankaŭ la tutnacia post-tertrema enketo pri la sekvoj farita de la portugala ĉefministro Pombal kontribuis al tiu nasko. Pombal ankaŭ menciindas, ĉar li forpelis la Jezuitojn kaj forte limigis la inkvizicion jam antaŭ la tertremo.

** Vidu la artikolon en tiu ĉi numero "Diismo: inter teismo kaj ateismo".*

**Nyegosh Dube (Pollando)**

# La egipta reĝimo celas ateistojn




EGIPTUJO ENKARCERIGAS LA ATEISTOJN

En kunteksto de kreskanta denuncemo, tribunalo de familiaj aferoj de Kairo decidis senigi patrinon je la rajto varti siajn du infanojn ĉar ŝi deklaris sin ateisto. Unuafoje tio okazas en la lando de la marŝalo Al-Sissi, kiu en julio 2013 puĉis kontraŭ la tiama prezidanto de Egiptio, la estro de la Islamaj Fratoj, nome Mohammed Morsi, nun kondamnita je tutviva mallibereco. La militisma-islamisma reĝimo de Al-Sissi, alfrontanta islaman terorismon, interalie en Sinajo kaj en lokoj malproksimaj de la grandaj urboj, decidis sendi pozitivajn signojn al la aktivaj defendantoj de ŝario. "Ekstremismo kaj ateismo estas du vizaĝoj de la sama afero" – tiel ripetadas la imamoj jam de pluraj monatoj sur ĉiuj kanaloj de la egipta televido, en kio ŝajnas esti nacia kampanjo kontraŭ la liberpenso. Tiu reakcia procezo komenciĝis post la publikigo de raporto de la tute oficiala Ĉef-Direkcio de la Islam-Juraj Aktoj. Unu el tiuj aktoj deklaras, ke ateismo estas malbono, kiu rapidege disvastiĝas tra la junularo. (La Universitato de Al-Azhar taksis la proporcion de ateistoj en la egipta popolo je 12% en 2015.)

Sekve, la Parlamenta Komisiono pri Religiaj Aferoj ellaboris leĝon kontraŭ ateismo: "Ĉiu homo kiu publike deklaras sian ateismon aŭ sian komprenemon al la ateistoj estos punita per mallibereco". Tiu subita rigidiĝo venis en nova kunteksto. Laŭ la esploristo Houssame Bentabet, kiu en 2014 publikigis tezon pri forlaso de Islamo, ateismo forte disvolviĝas tra la islama mondo. "La problemo estas, ke laŭ la is-

lama juro di-rifuzantoj estu mortkondamnitaj. La kvar sunaaj juraj skoloj akordiĝas pri tio, kaj sekve ĝi estas enskribita en la konstitucioj de pluraj islamaj landoj", notis pasint-aŭguste sociologo en la kristana ĵurnalo *La Croix*.

Sed tiu malamo al la ateistoj koncernas ne nur la islaman mondon. "Ateistoj estas mortigitaj en dek tri islamaj landoj, sed suferas diskriminacion en la tuta mondo", memorigis en 2013 raporto de la Internacia Humanisma kaj Etika Unio. Ekzemple en Hindio, la polico malemas enketi pri murdoj de ateistoj fare de religiaj fundamentistoj. Laŭ tiu raporto, kvankam la situacio estas "relative kontentiga" en Usono, aro da leĝoj kaj viv-reguloj substrekas la samecon de kredanteco kaj usonaneco. Koncerne Egiption, la supre menciita leĝo-propono planas kontrolon kore de la privata vivo de la civitanoj. Specialaj policistoj estas asignitaj por kontroli en Interreto pri ĉio kontraŭreligia. Sed tiu leĝo kontraŭas la egiptan konstitucion, kiu ĝis nun garantiis la kredo-liberecon.

*Artikolo de Stéphane Aubouard aperinta en la ĵurnalo l'Humanité la 26an de decembro 2017 kaj tradukita de* **Christian Rivière (Francio)**.

## La kruco: ĉu simbolo de religio aŭ de identeco?

La ministro-prezidanto de la germana subŝtato Bavarujo ĵus ordonis, ke krucoj estu pendigitaj en ĉiuj ŝtataj konstruaĵoj ekde la 1-a de junio. Markus Söder estis elektita en marto 2018, kaj unu el liaj unuaj agoj estis pendigi krucifikson en la vestiblo de la kancelierejo en Munkeno. Laŭ li tio estas "aserto de niaj bavara identeco kaj kristanaj valoroj".

La ordono rilatas nur al agentejoj de la bavara subŝtato, kiuj tamen inkluzivas lernejojn kaj tribunalojn. La landa registaro ne havas aŭtoritaton super lokaj aŭ federaciaj konstruaĵoj.

Söder pretendas, ke la ordono ne kontraŭstaras la regulojn en la konstitucio rilate al religia neŭtraleco, ĉar la kruco simbolas la "bavaran identecon" pli ol religion. Bavarujo estas plejparte kristana subŝtato: pli precize, ĝi estas plejparte katolika. En 2016 50.5% de ĝiaj loĝantoj estis romkatolikaj kaj 18.8% estis protestantaj. Tio tamen lasas signifan proporcion, kiu estas islama, juda, ateista aŭ alia.

la kruco simbolas la "bavaran identecon" pli ol religion.

La ordono tuj vekis amason da ŝercaj komentoj ĉe la sociaj komunikiloj, kie la foto de Söder tenanta krucifikson estis transformita al foto de li kun diversaj objektoj enmane, kiel ekzemple poreo aŭ botelo da biero. La politika opozicio reagis furioze, asertante ke lia celo estas ĉefe kapti konservativajn kristanajn voĉojn antaŭ la landa balotado en oktobro. Membroj de aliaj partioj plendis, ke Söder ekspluatas religion por persona kaj politika avantaĝo.


Juristoj diskutas, ĉu la ordono de la bavara registaro kontraŭstaras germanajn leĝojn rilate al neŭtraleco. Thomas Schüller, katolika teologo ĉe la universitato de Münster, opinias, ke la afero estas almenaŭ dubinda, kaj komentas, ke prezenti la krucon kiel simbolon de la bavara kultura identeco malgravigas ĝin kvazaŭ ĝi estus nura folkloraĵo. Tiun opinion subtenas ankaŭ la kardinalo Reinhard Marx. En intervjuo en *Süddeutsche Zeitung* li diris, "Kiu vidas la krucon nur kiel kulturan simbolon ne komprenas ĝian veran signifon." Li aldonis, ke la ordono de Söder praktike akaparas la krucon nome de la ŝtato.

*Verkita de* **Anna Lowenstein (Britio)** *surbaze de artikoloj en la anglalingva retejo de Deutsche Welle www.dw.com/en.*

# Kristanismo en Germanio: preĝejoj malplenaj, eklezioj riĉaj

La pejzaĝo de la germana Kristanismo prezentas fortan kontraston: unuflanke tre malaltan nivelon de partoprenado en preĝejaj diservoj kaj ceremonioj, sed aliflanke ekleziojn riĉajn pro devigaj imposto-pagoj fare de registritaj katolikoj kaj protestantoj, vastskalan posedadon de proprietaĵoj, kaj kompens-pagojn pro eksproprietigo dum la epoko de Napoleono.

Germanio ludis gravan rolon en la historio de Kristanismo, interalie pro la Reformacio lanĉita de Martin Luther kaj la religiaj militoj de la 17a jarcento. Daŭre preskaŭ 60% da germanoj apartenas al kristanaj eklezioj, ĉu la katolika, la ĉefprotestanta ("Evangelia Eklezio"), ortodoksaj aŭ iuj aliaj. Estas rimarkinde, ke en la naskiĝlando de la protestanta Reformacio, troviĝas pli da katolikoj (29% de la loĝantaro) ol protestantoj (27%), malgraŭ tio, ke la reunuiĝo en 1990 aldonis grandan protestantan regionon al la germana federacio.



"La sola muro, kiun bezonas Usono – unuflanke ŝtato, aliflanke religio"
(Desegnita de: M. Wuerker)

## Malplenaj preĝejoj

Kiel en multaj aliaj eŭropaj landoj, kreskas la fendo en Germanio inter formala apartenado al iu eklezio kaj praktikado de la religiaj doktrinoj kaj ritoj de tiu eklezio. La ciferoj ja estas okulfrapaj. Laŭ la Konferenco de Germanaj Episkopoj, nur 10.2% da registritaj katolikoj regule ĉeestas dimanĉajn diservojn. Inter protestantoj, la proporcio estas eĉ pli malalta: nur 3.5%! Sed temas ne nur pri diservoj: falas ankaŭ la kvantoj de baptoj, geedziĝoj kaj entombigoj faritaj kadre de la du ĉefaj eklezioj.

Partoprenado en katolikaj diservoj fakte preskaŭ duoniĝis ekde la komenco de nia jarmilo – je pli ol 2.2 milionoj ĝis la nuna cifero de 2.5 milionoj, laŭ la ĵurnalo *Handelsblatt.* Antaŭ 50 jaroj, pli ol 11 milionoj regule vizitadis katolikajn preĝejojn por ĉeesti diservojn.

Alia grava statistiko estas ke inter la jaroj 2010 kaj 2015, mezume 167,000 katolikoj kaj 180,000 protestantoj oficiale eksiĝis el siaj eklezioj ĉiujare. Ĉi tie indus aldoni, ke ĉirkaŭ 35% da germanoj estas senreligiaj, sed en la eksa GDR (Orienta Germanio), tiu cifero estas ĉirkaŭ 75%, la plej alta procento en la mondo. Plue, laŭ la ĵurnalo *Tagesspiegel*, eĉ 24% da registritaj protestantoj kaj 11% da registritaj katolikoj ne kredas je Dio.

## Tamen plenaj ekleziaj kasoj

Sed malgraŭ tiuj ĉi tre malfavoraj statistikoj, la du plej grandaj eklezioj de Germanio, la Katolika Eklezio kaj la Evangelia Eklezio, ĝuas grandajn enspezojn pro tre favora al ili imposto-sistemo. Ĉiu registrita membro de unu el tiuj eklezioj devas aldone pagi 9% de sia deviga imposto-kvanto (8% en du germanaj subŝtatoj) por la subteno de sia eklezio – do la federacia registaro transdonas al la eklezioj imposto-pagojn de ĉiuj iliaj registritaj anoj kaj pro tiu servo ricevas 3% de la kolektitaj por-ekleziaj impostoj.

Tiamaniere la Katolika Eklezio kaj la Evangelia Eklezio sukcesis kolekti rekordajn sumojn en 2016: €6.16 miliardoj kaj €5.45 miliardoj respektive.

Sed la du plej grandaj eklezioj riĉas ne nur pro jaraj impost-enspezoj; ili ankaŭ posedas multe da tero kaj milojn da konstruaĵoj (krom preĝej-

oj). Kune ili posedas 830,000 hektarojn (8300 kvadrat-kilometrojn) da tero, dum la Katolika Eklezio havas ĉirkaŭ 66,000 konstruaĵojn kaj la Evangelia Eklezio ĉirkaŭ 50,000 – inkluzive tiujn ligitajn kun sanzorgado, edukado, kaj bonfarado, kaj aliajn kiujn ili ludonas kiel loĝejojn kaj komercejojn.

Krome, ili ricevas jarajn ŝtatajn monpagojn kiel kompenson por proprietaĵoj forprenitaj dum la Sekularigo de 1803, kiam eklezia j regantoj perdis siajn teritoriojn kadre de la disfalo de la tiel nomata Sankta Romia Imperio kaŭzita de Napoleono. La pagoj al la du eklezioj egalis ĉirkaŭ €500 milionoj en 2017, sumo kiu inkluzivas salajrojn de episkopoj (inter €8000 kaj €11,500) kaj aliaj eklezia j oficistoj kaj dungitoj. Estas aparte rimarkinde, de ĉiuj impost-pagantoj kontribuas al tiuj kompens-pagoj, senkonsidere ĉu ili apartenas al tiuj eklezioj.

Tiu ĉi kompensado estas akre kritikata de iuj en Germanio. Fakte jam en la 19a jarcento oni proponis anstataŭigi la jarajn pagojn per unufoja pago. Sed la jaraj pagoj daŭris; ili estas vere konstanta fonto de publika mono, krom la kvantoj ricevataj per la impost-sistemo. Ĝenerale la netravidebleco de la uzado de publika mono fare de germanaj eklezioj, kaj ankaŭ de la amplekso de iliaj proprietaĵoj, estas kritikata.

La germana strukturo klare kontraŭstaras la principon de apartigo de la ŝtato disde religio. Kvankam publika mono povus prave subteni la materialan bonstaton de historie kaj arkitekture valoraj preĝejoj, monaĥejoj ktp, estas tute alia afero subteni ekleziojn per publika mono, precipe en situacio en kiu forte malkreskas la nombro de regulaj preĝej-vizitantoj. Certe estas bezonata en Germanio denova sekularigo.

*Artikolo verkita ĉefe surbaze de la artikolo "6 facts about Catholic and Protestant influence in Germany" el la retejo www.dw.com. Aliaj fontoj: "The opaque financing of Germany's churches" (dw.com), "Millions for the bishops" (concordatwatch.eu), "Religion in Germany" (Wikipedia).*

**Nyegosh Dube (Pollando)**

☆

## Irlanda referendumo: grandskala malakcepto de katolika dogmo

Dum longa tempo, Irlando estis konata kiel konservativa katolika lando. La katolika eklezio tie agis kiel subprema reakcia socia forto. La 25-an de majo 2018, irlandanoj faris grandan paŝon en la daŭra procezo de ilia liberiĝo de katolika superregado. Ili voĉdonis kun majoritato de du trionoj favore al propono nuligi la Okan Amendon de la Konstitucio, kiu malpermesis abortigon. Antaŭ 35 jaroj kun la sama majoritato irlandanoj voĉdonis por la konstitucia malpermeso, kiu plifortigis la jam ekzistantan malpermeson. Do vere la irlanda socio multe sekulariĝis intertempe.

Unu granda instigo por forigi la malpermeson estis la morto en 2012 de 31-jaraĝa hindino Savita Halappanavar en hospitalo en Galivo. En la 17a semajno de ŝia gravedeco, ŝi akre malsaniĝis, havis teruran doloron, kaŭzitan de sepso pro la gravedeco. Ŝi kaj ŝia edzo petis plurfoje al la hospitalo fari abortigon, sed la hospitalo rifuzis pro la kontraŭabortiga leĝo. Kuracistino informis ilin, hinduojn kies religio ne malpermesas abortigon, ke "tiu ĉi estas katolika lando, kaj ne eblas abortigi ĉar la feto ankoraŭ vivas". Fine, mortis la patrino kaj la feto – pro katolika dogmo enleĝigita. Pro la dogme bazita leĝo, Savita ne estis savita.

Nun espereble la irlanda sekulara venko kondukos al organizado de referendumo en katolika Pollando por nuligo de simile severa kontraŭabortiga leĝo. En 2016, kiam estis provo eĉ pli rigorigi la leĝon, okazis grandaj virinaj protestoj en pluraj urboj. La leĝ-propono estis retirita. (Vidu artikolon pri tio en *Ateismo*, novembro 2016.)

**La redakcio de *Ateismo***

☆

# Francaj liberpensuloj bonvenigas la rezulton en Irlando

La franca Nacia Federacio de la Liberpenso publikigis komunikaĵon, per kiu ĝi bonvenigis la rezulton de la irlanda referendumo pri abortigo. La francaj liberpensuloj transdonis "siajn plej fratecajn salutojn al la tuta Irlanda popolo, al ĉiuj demokrataj organizaĵoj pri la rajtoj de la virinoj, al asocioj sekularaj, humanismaj, ateismaj, kiuj agadis por ke tia rezulto estu ebla".

Laŭ leĝo-propono, sekve de la nuligo de kontraŭ-abortiga konstitucia amendo, memvola abortigo povos esti farita senpravige en la unuaj 12 semajnoj de gravedeco; ĝis la 24a semajno okaze de sanrisko por la patrino; poste nur okaze de anomalio de la feto.

En sia deklaro, la federacio ankaŭ memorigis pri du antaŭaj referendumaj rezultoj, kiuj indikis la daŭran sekulariĝon de Irlando: la aprobo al eksgeedziĝ-rajto en 1995 kaj la aprobo al edz(in)iĝ-rajto por ĉiuj (t.e. la rajto estis plivastigita por ampleksi samseksajn parojn).

*Preparita surbaze de traduko de komunikaĵo de la franca Liberpenso tradukita de* **Christian Rivière (Francio).** *La komunikaĵo legeblas en la retejo de la Internacia Asocio de Liberpenso: http://www.internationalfreethought.org/spip.php?article652*

☆

# Mortpuno por apostateco kaj blasfemo en Maŭritanio

Mortpuno estos deviga por krimoj ligitaj kun apostateco kaj herezo en Maŭritanio, laŭ nova leĝo aprobita de la Nacia Asembleo la 27an de aprilo.

Grupo de 21 neregistaraj organizaĵoj, inkluzive de la Internacia Humanisma kaj Etika Unio (IHEU), Amnestio Internacia, PEN Internacia, kaj Raportistoj Sen Landlimoj, publikigis kunan deklaron alvokante al la registaro nuligi la novan leĝon.

La nova leĝo estis aprobita ĝuste dum Nuakŝoto, la maŭritania ĉefurbo, gastigis kunvenon de la Afrika Komisiono de Homaj kaj Popolaj Rajtoj. Tiu evento finiĝis per alvoko al Maŭritanio rekonsideri siajn kontraŭblasfemajn leĝojn. Krome, pluraj Specialaj Raportantoj de la UN alvokis al Maŭritanio liberigi enkarcerigitan verkiston Mohamed Cheikh Ould M'kheitir

**El la retejo de IHEU - iheu.org**

☆

# Ne ĉiuj junaj turkoj kredas je Islamo

"Nur mia kaptuko ankoraŭ ligas min kun Islamo," Merve, instruistino de religio ĉe elementa lernejo en Turkio, rakontis al ĵurnalistino de BBC. Ĝis lastatempe ŝi estis radikala kredanto de Islamo. "Mi rifuzis eĉ premi la manon de viro. Sed nun mi ne plu scias, ĉu ekzistas Dio aŭ ne, kaj verdire tio ne plu gravas al mi."

La partio de Prezidanto Erdogan tenas la potencon de dek ses jaroj, kaj dum tiu periodo la nombro de religiaj lernejoj tra Turkio pli ol dekobliĝis. Li ofte diras, ke oni nun edukas pian generacion. Sed dum la lastaj semajnoj, laŭ artikolo ĉe BBC je la 10a de majo, politikistoj kaj religiaj gvidantoj diskutas, ĉu piaj gejunuloj komencas ne plu interesiĝi pri religio.

La vivo de Merve ŝanĝiĝis en unu tago, kiam ŝi vekiĝis tre deprimita, ploradis dum horoj, kaj decidis preĝi. Dum ŝi preĝis ŝi konstatis kun ŝoko,

ke ŝi dubas pri la ekzisto de Dio. "Mi pensis, ke mi aŭ freneziĝos aŭ mortigos min," ŝi diris. "La postan tagon mi konstatis, ke mi perdis mian fidon."

Ŝi ne estas sola. Laŭ unu profesoro, almenaŭ dekduo da studentinoj kun kaptuko venis al li dum la lasta jaro por deklari, ke ili estas ateistoj.

***Bekir, studento de teologio***

*Ĝis lastatempe mi simpatiis kun radikalaj grupoj kiel Islama Ŝtato aŭ Al Qaeda. Hodiaŭ mi estas ateisto. Unue mi serĉis la logikon de Islamo, sed ne trovis ĝin. Tiam mi komencis demandi min ankaŭ pri la ekzisto de Dio. Antaŭe mi subtenis nian islamisman registaron. Sed subpremado bredas revolucion. Oni komencis subpremi nin, kaj ni komencis reagi.*

Tamen la studentoj ne turnas sin nur al ateismo. Ĉe laborgrupo en Konya, unu el la plej konservativaj urboj en Turkio, oni informis, ke studentoj en religiaj lernejoj turnas sin al diismo pro la "nekonsekvencoj en Islamo", laŭ raportoj en ĵurnaloj de la politika opozicio. Sekvantoj de diismo kredas, ke ja ekzistas Dio, sed ili malakceptas ĉiujn religiojn. Laŭ tiu filozofio, Dio kreis la universon kaj ĉiujn vivantajn estaĵojn, sed li ne intervenas en homaj aferoj, nek starigas regulojn kaj principojn.

La ministro pri edukado İsmet Yılmaz asertas, ke tiu laborgrupo ne havis sciencan bazon, kaj li neas raportojn, laŭ kiuj la "pia generacio" ŝanĝas direkton. Ne ekzistas statistikoj aŭ sondoj por indiki, ĉu tiu kontraŭreligia fluo estas disvastiĝanta fenomeno, tamen eĉ la onidiroj sufiĉas por maltrankviligi la politikajn gvidantojn.

***Leyla, universitata studentino***

*Iun tagon, dum mi marŝis laŭ la vojo al la bazaro, mi demetis mian kaptukon kaj neniam remetis ĝin. Mia patro ne scias, ke mi estas diisto. Se li scius, mi timas, ke li povus malhelpi mian pli junan fratinon studi ĉe la universitato. Eble li dirus, "Via fratino iris studi, kaj rigardu, kio okazis al ŝi". Mi ne petis Dion krei min, do Dio ne rajtas postuli de mi ion ajn. Mi rajtas vivi same libere kiel birdo.*

Ankaŭ Ali Erbaş, la plej grava religia gvidanto en Turkio, kaj estro de la Direktorejo de Religiaj Aferoj, neis la disvastiĝon de diismo kaj ateismo inter la konservativa junularo. Laŭ li: "Neniu turko iam ajn aliĝus al tiel malnormala kaj senvalora koncepto."

***Omer, eksigita ŝtatoficisto, nun senlabora***

*Antaŭe mi estis ŝtatoficisto. Post la malsukcesa puĉo en 2016 mi estis forigita. Antaŭe mi estis konservativa religiulo, kiu forte subtenis la regantan partion kaj ĝiajn politikojn. Kiam mi estis forigita el mia posteno, mi komencis dubi pri Dio. Mi distanciĝis de li. Mi ankoraŭ ne konsideras min diisto. Mi esperas rekonstrui mian rilato kun Islamo, sed mi ne scias, ĉu tio ankoraŭ estas ebla.*

La ĵurnalistino de BBC renkontis Merve la duan fojon en ŝia hejmo. Ŝi ne plu portis kaptukon. Ŝi decidis malkovri sian hararon, kiam ŝi estas hejme, eĉ antaŭ viroj. "La unuan fojon, kiam mi renkontis viron sen mia kaptuko, mi sentis min vere senaplomba. Sed nun, tio ŝajnas tute natura. Jen la nova mi."

*Ĉiuj nomoj de la ateistoj kaj diistoj intervjuitaj por la artikolo estis ŝanĝitaj. Artikolo el BBC ("The Young Turks rejecting Islam") tradukita en redaktita formo de* ***Anna Lowenstein (Britio).***

## Ateisto fariĝas ĉefministro de Hispanio

En la antaŭa numero de *Ateismo* (novembro 2017), ni raportis pri la senbiblia enoficiga ĵuro de la nova novzelanda ĉefministro. Nun simile okazis en Hispanio post la subita forigo de Mariano Rajoy (de la Popola Partio), kiu malvenkis



**Pedro Sanchez**
(Foto el: Reuters / Susana Vera)

en voĉdono pri demisio de la registaro. La nova ĉefministro, Pedro Sánchez (de la Socialisma Partio), estas ateisto kaj faris sian ĵuron sen Biblio kaj krucifikso. Tio estis la unua senreligia enoficiĝo de ĉefministro en la historio de la demokratia Hispanio post Franco.

Antaŭ kaj dum sia enlanda milito (1936-39), Hispanio spertis kverelojn kaj poste sangoverŝadon inter sekularistoj kaj religiemuloj. La respublikana konstitucio de 1931 forte limigis la privilegiojn de la katolika eklezio. Tio kontribuis al la kreskanta fendo inter la dekstro kaj maldekstro. Post la venko de Francisco Franco, la eklezio refariĝis oficiala kaj regajnis sian fortan pozicion. Sekulariĝo (kvankam malpli ŝtat-pelita) rekomenciĝis post la la fino de la Franco-reĝimo en 1975.

**La redakcio de *Ateismo***

☆

## Humanisma agado kreskas en Islando

Tiuj membroj de ATEO, kiuj ĉeestis nian kunvenon en Rejkjaviko en 2013, certe memoras la tre interesan paroladon de Hope Knútsson, tiama prezidanto de Islanda Etika Humanisma Asocio. Artikolo pri tiu kunveno aperis en la 17a numero de nia revuo de novembro 2013.

Hope, kiu estis unu el la fondintaj membroj de IEHA (aŭ Sidmennt, kiel ĝi nomiĝas en la islanda), nun retiriĝis kiel prezidanto, tamen ŝi plu respondecas pri ĝia programo de nereligiaj konfirmacioj, pri kiu ŝi parolis dum la kunveno de ATEO. Tio estas granda kaj kreskanta tasko, laŭ raporto kiun ŝi nun sendis al nia revuo, surbaze de prezentaĵo farita de la direktoro de Sidmennt, Bjarni Jónsson, dum la Jarkunsido de Nordlandaj Humanismaj Asocioj en aprilo 2018.

Laŭ tiu prezentaĵo la membraro de Sidmennt kreskis de 30, kiam ĝi estis fondita en 1991, ĝis 300 en 2013. En tiu jaro post dek du jaroj da luktado kaj diskutado rilate al la koncepto “vivfilozofia organizaĵo”, la islanda parlamento finfine akceptis Sidmennt kiel la unuan registritan sekularan vivfilozofian asocion, kun egala jura kaj financa statuso kiel religiaj organizaĵoj. De tiam Sidmennt spertis eksterordinaran kaj daŭran kreskadon, de 300 en 2013 ĝis 2750 en 2018.

Ĝia programo de laika konfirmacio komenciĝis en 1989 kun 16 infanoj. Ĉi-jare 11% el ĉiuj infanoj en la aĝo de konfirmacio (13 jaroj) partoprenis en la sekularaj ceremonioj organizitaj



Junuloj ricevas konfirmaciajn diplomojn kaj estas bonvenigataj en plenkreskulan socion kaj ĝiajn respondecojn.

de Sidmennt: t.e. 470 infanoj en dek kvar ceremonioj, kiuj okazis en pluraj lokoj tra la lando. (Memoru, ke la tuta loĝantaro de Islando estas nur 350 000!) Tiu laika konfirmacio anstataŭas la luteranan konfirmacion, kiu estis kutima antaŭ ol Sidmennt kreis sian programon.


Sidmennt ankaŭ gvidas geedziĝajn kaj funebrajn ceremoniojn, kaj ceremoniojn de bebo-nomado. En 2008 ĝi havis 6 celebran-tojn. Ĝi nun havas 33, kaj pretigas pliajn 15 homojn por tiu laboro.

*Artikolo preparita de la redakcio surbaze de informoj provizitaj de* **Hope Knútsson (Islando).** ☆

# Forpasis astrofizikisto Stephen Hawking

La 14-an de marto 2018 je la aĝo de 75 jaroj adiaŭis la mondon la famega sciencisto per la vortoj: “Mia vivo estis grandioza.”

En sia 21a vivojaro li subite malsaniĝis je amiotrofa lateralsklerozo (ĝenerale konata per la mallongigo ALS), serioza, nekuracebla nervomalsano. Ekde la jaro 1985 li perdis parolkapablon, kaj en lasta jaroj komunikis per komputilo, kiun li stiris per okulmovoj.



Dum sia aktivega vivo Hawking turneis tra la mondo, klarigante la fizikon, avertante kontraŭ klimatŝanĝo, mortdanĝeraj virusoj kaj maŝinoj kun artefarita inteligenteco. Lia plej grava hipotezo estis la malapero de nigraj truoj en la kosmo. Ĉar tio estis nepruvebla, li ne ricevis la Nobel-premion.

Li estis furora aŭtoro de popularsciencaj verkoj, kiu klarigis la ekeston de la universo per fizikaj leĝoj. Tutcerte neniu dio kreis ĝin, li deklaris. Li kredis, ke post la morto la homaj korpo kaj animo fariĝos polvo.

*Nekrologo aperinta en Der Bund, svisa ĵurnalo kaj tradukita de* **Dieter Rooke (Svislando)**

☆

# Ateismo

**Organo de ATEO**

**Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo**


**Vorto de la Redaktoro** 2

**Ideoj kaj Pensoj**

Ĉu eblas esti ateisma kaj religia? 3

Ĉeĥa reĝisoro pri la katolika eklezio 5

Diismo: inter teismo kaj ateismo 6

Konsilo al kristanoj 7

Ĉu bona Dio? 8

Renaskiĝo de printempo 9

**Historiaj Perspektivoj**

La Portugala Inkvizicio: nekonata sed brutala 9

La lisbona tertremo de 1755 kaj ĝiaj teologiaj postsekvoj 11

**Ĉirkau la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj**

La egipta reĝimo celas ateistojn 12

La kruco: ĉu simbolo de religio aŭ de identeco? 13

Kristanismo en Germanio 14

Irlanda referendumo: grandskala malakcepto de katolika dogmo 15

Francaj liberpensuloj bonvenigas la rezulton en Irlando 16

Mortopuno por apostateco kas blasfemo en Maŭritanio 16

Ne ĉiuj junaj turkoj kredas je Islamo 16

Ateisto fariĝas nova ĉefministro de Hispanio 18

**Ateisma Vivo**

Humanisma agado kreskas en Islando 18

Forpasis astrofiziko Stephen Hawking 19



**Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:**

**ateismo.bulteno@gmail.com**

**Por informo:**

**anna.lowenstein@esperanto.org**

Prezidanto: (Vakas)

Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio

Sekretario: Anna Löwenstein, Britio

Kasisto: Dieter Rooke, Svislando

Enpaĝigo: Jakvo Schram, Belgio

Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando

Jarkotizo: 10€ por A-landoj

8€ por B-landoj

Konto: **ateo-y** ĉe UEA